The Esperanto League will welcome any "sincere efforts to restore unity" on the part of EANA growing out of this request by the international movement, and any such overtures will be given careful attention.



Danish cartoonist Bo Bojesen thinks Esperanto, in bottles, would loosen all tongues (From "Danish Outlook")

HEROLDO DE ESPERANTO

DUONMONATA INTERNACIA
ORGANO DE LA ESPERANTO-
MOVADO

Prezoj en 1954:

Abono tutjara	\$4.00
Abono julio-decembro	2.00
Abono subtenanta	8.00
Anonceto po 25 vortoj.....	.50

Nordamerika peranto:

★ Donald E. Parrish
328 West 46th Street
Los Angeles 37, Calif.

LA VERDA PAPAGO

De Lehman Wendell

Sinjoro John Davis, UEA-delegito en mez-Usona urbo, staris antaŭ la fenestro de dombesta vendejo kaj atente rigardis kvar belajn papagojn. Ĉe la flanko de la birdoj staris afiŝo kun la jena surskribo:

MIRINDAJ PAPAGOJ

Parolas diversajn lingvojn

Elektu birdon laŭlingve

Sinjoro Davis rigardis la papagojn, legis la afiŝon, kaj unu fojon plu rigardis la birdojn. Subite lia vizaĝo eklumiĝis, kvazaŭ li estus trovinta solvon al malfacila problemo. Li ridetis, eniris la butikon kaj salutis la administranton.

“Bonan tagon”, li diris. “Mi multe admiras viajn papagojn”.

“Dankon, Sinjoro. Jes, ili estas mirindaj birdoj. El Afriko oni sendas papagojn al dresisto en Parizo, kiu instruas al ili diversajn lingvojn. Postulas longan tempon por instrui ilin, sed li mirinde sukcesas, eĉ kun la plej mallertaj birdoj.”

“Ĉu vere? Interesa fakto. Mi ofte vidis papagojn, kiuj kapablas paroli du-tri anglajn vortojn, sed mi neniam kredis, ke ili povas paroli aliajn lingvojn. Mi supozis, ke la langoj de papagoj estas tiel konstruitaj, ke ili kapablas paroli nur angle.”

“Tute ne, sinjoro! Tute ne! Oni povas instrui al ili plej diversajn lingvojn. Papagoj en la manoj de lerta dresisto fariĝas veraj poliglotoj. Ili parolas hispane, germane, norvege, hebree, ruse, japane, kaj tiel plu. Mi eĉ vidis unu birdon, kiu bone parolis la malfacilan hotentotan lingvon. Jes, Sinjoro, kiel mi jam diris, papagoj en la manoj de lerta dresisto fariĝas veraj poliglotoj.”

“Birdoj poliglotoj! Ha, ha! Kompreneble vi ne havas papagon, kiu parolas Esperanton, ĉu?”

“Ne havas? Kia demando! Certe mi havas. Esperanto estas facila lingvo, diras la dresisto, kaj la birdoj ellernas tiun lingvon pli facile ol iun nacian lingvon.”

8



“Plej interese. Kaj ĉu ili ankaŭ komprenas la lingvon?”

“Komprenas? Certe ili komprenas, sinjoro. Alparolu la verdan birdon en la ruĝa kaĝo kaj vi baldaŭ konstatos, ke ĝi komprenas la lingvon tiel bone, kiel ĝi parolas ĝin.”

“Mi ĝojas pri tio,” respondis la alia. “Mi estas Esperantisto, vi komprenas; ankaŭ servas kiel delegito por la Universala Esperanto-Asocio. Plej grava ofico, mi devas diri. Ne knaba ludo. Preskaŭ ĉiutage mi ricevas leterojn el fremdaj landoj, kaj kiel delegito estas mia devo respondi al ili. Sed mi estas tre okupita homo, vi komprenas, estas tre populara civitano, estas prezidanto, aŭ vicprezidanto, aŭ kasisto, aŭ sekretario, aŭ pedelo, de multaj kluboj, kaj pro tio mi neniam trovis sufiĉe da tempo por bone lerni Esperanton. Ŝajnas al mi, tamen, ke per tiu birdo, kun kiu mi povus interparoli ĉiutage, mi tre facile povus ellerni la lingvon. Kion vi pensas pri tio?”

La administranto, kiu dum tuta semajno ne estis vendinta eĉ unu birdon,

kaj kiu urĝe bezonis monon, nun iomete mensogis, por ke li povu vendi birdon. Li diris, “Mi estas certa, sinjoro, ke tiu birdo povas facile instrui al vi Esperanton. La franco, kiu dresis ĝin, skribis al mi specialan leteron pri ĝi. Li diris, ke la birdo, kiun vi nun rigardas, parolas la lingvon en vere majstra maniero. Ĝi eĉ korekte uzas la akuzativon, skribis la franco. Nu, kio estas la akuzativo mi ne scias, ĉar mi ne parolas Esperanton, sed mi supozas ke ĝi estas io, per kio la birdo akriĝas la bekon.”

“Sinjoro, ĉu vi garantios, ke la birdo parolas kaj komprenas Esperanton?”

“Tio estas taŭga demando. Mi certe ne deziras, ke vi elspezu vian monon senrezulte. Vi bezonas nur alparoli la birdon por konstati, ke ĝi parolas kaj komprenas.”

Sinjoro Davis sin turnis al la birdo. “Bona tago”, li diris, kiel kutime forgesante la akuzativon, “bona tago!”

La birdo rigardis lin largokule, flankenmetis sian kapon kaj per raŭka pe-pado respondis tute gramatike,

“Bonan tagon, bonan tagon, tagon, tagon, gr-r-r-r!”

La okuloj de la delegito ekbrilis pro ĝojo. “Ĉu vi komprenas?” li diris al la birdo.

“Komprenas, komprenas, komprenas”, pepis la papago.

“Mirinda birdo”, diris Sinjoro Davis. “Ĝi diras, ke ĝi komprenas. Mi devas posedi tiun birdon. Kiom ĝi kostas?”

“Kiom ĝi kostas? Vera bagatelo, Sinjoro. Mi devus diri cent dolarojn, sed en la nuna tempo mi havas tro multajn papagojn kaj mi vendos ĉi tiun bonegan papagon por nur kvindek dolaroj. Por tia sumo mi kvazaŭ donacas la birdon al vi, sinjoro.”

“Jen via mono.”

“Dankon, sinjoro. Vi ne faris eraron elektante tiun birdon. Ĝi parolas eĉ pli bone ol la aŭtoro de Esperanto, tion diris la franco. Neniam forgesas la akuzativon. Jen via kvitanco. Dankon kaj adiaŭ.”

Sinjoro delegito John Davis eliris el la butikoj, kaĝon en mano, rideton sur la vizaĝo. Kiam li atingis sian hejmon li tenis la kaĝon post la dorso, puŝis la butonon de la elektra sonorilo kaj atendis. La edzino malfermis la pordon kaj ricevis dolĉan kaj eble tro laŭtan kison.

“Kion vi tenas post la dorso?” ŝi demandis, ekvidante la kaĝon.

“Ho, mi aĉetis mirindan papagon. KREDU min, ĝi parolas Esperanton; ankaŭ komprenas la lingvon.”

“Ho, kia frenezajo! Birdoj ne povas paroli kaj kompreni.”

“Ne povas? En kiu universitato vi lernis vian A, Bo, Co? Mi ja bone scias, ke paseroj ne povas paroli kaj kompreni, nek povas korvoj, nek agloj, nek meleagroj, nek kokinoj. Sed papagoj estas en alia klaso. Ili estas aristokratoj kaj kleruloj en la birda mondo. Post zorga dresado ili parolas plej diversajn lingvojn: parolas svede, tatare, sanskrite, kaj aliajn malfacilajn lingvojn. Mia papago ne nur parolas, ĝi ankaŭ komprenas kaj rezonas.”

“Ĉu vi vere kredas tion, John?”

“Mi ne kredas, mi scias! Mi bezonas nur paroli al la birdo kaj ĝi tuj komprenas kaj tre inteligente respondas. Kiel la birdo akiris tian mirindan intelekton mi tute ne povas kompreni; mi scias nur, ke la birdo estas eksterordinare klera. Atendu momenton, kaj mi montrós al vi ĝian lertecon.”

Li formetis siajn ĉapelon kaj palton, metis la kaĝon sur tablon kaj sidigis apud la tablo. Tiam li alparolis la papagon. “Bona tago, bona tago”, li diris al ĝi.

“Bonan tagon, bonan tagon, bonan tagon, gr-gr-r-r-r”, pepis la birdo.

“Ĉun vin komprenas?” diris la delegito, fuŝe parolante.

“Komprenas, komprenas, komprenas”, diris la birdo.

“Nu, edzino, ĉu vi nun kredas, ke la papago parolas kaj komprenas Esperanton?”

“Vere, ĝi parolas kaj komprenas”, diris la edzino mirigite. “Tamen, ĉu vi volas aŭskulti al ĉiam babila birdo? Mi certe ne volas.”

“Certe ne, mia kara. Mi devas klarigi. Mi ja ricevas multajn leterojn ĉiutage el diversaj partoj de la mondo, kaj ili enhavas demandojn, kiujn mi, kiel delegito, devas respondi. Sed mi ne povas respondi tre bone al ili ĉar mi, kiel vi, ne bone scias Esperanton. Nu, la birdo lerte parolas Esperanton, eĉ komprenas la lingvon kaj rezonas en ĝi. Do, kiam mi devas respondi al leteroj mi legos la demandojn al la papago, ĝi respondos, kaj vi stenografe transkribos la respondojn. Ĉu ne bona ideo?”

“Vi certe estas genia homo”, diris la edzino fiere. “Kiu, krom vi, povus elpensi tian aferon! Mi fieras pri vi, John.”

“Ĉu leteroj venis hodiaŭ?”

“Jes, jen leteroj el Parizo, Romo, kaj Stokholmo.”

Delegito Davis malfermis la kovertojn kaj malrapide legis la leterojn, unu post alia. Per helpo de kvar vortaroj li fine komprenis la enhavon de la leteroj. “Ha, interesaj demandoj en ĉi tiuj leteroj”, li diris al la edzino. “Prenu paperon kaj kraĵonon kaj mi faros la demandojn al la papago. Sinjoro Fernando Bossi, en Romo, faras strangan demandon.” Li turnis sin al la papago kaj kun granda peno legis: “Ĉu estas vere, ke en Novjorko la konstruaĵoj estas tiel altaj, ke ili tuŝas la nubojn?”

Notu!

La baptonomo de S-ro Heinrich (vidu “Nova Vivo por Gertrud” en nia antaŭa numero) ne estas “Gustav”, sed “August”. Ni bedaŭras la eraron.

La papago rigardis lin per du grandaj okuloj kaj pepis, “Bonan tagon, bonan tagon, tagon, tagon, tagon, gr-r-r.”

“Ha, ha!” ridis la edzino. “Via bela, klera, mirinda birdo ne komprenas Esperanton. Ha, ha, ha, mi mortos pro ridado!”

“Ne komprenas?” diris la delegito konfuzite kaj iom kolere. “Certe ĝi komprenas, sed la demando sendube ŝajnas al ĝi tro infana kaj ĝi ne volas respondi. Jen alia letero el Stokholmo.” Li sin turnis al la papago kaj legis: “Mi serĉas edzinon, kaj oni diras, ke en via lando sin trovas multaj belaj riĉaj fraŭlinoj. Ĉu vi povas sendi al mi adresojn de kelkaj?”

La papago laŭte pepadis, “Komprenas, komprenas, bonan tagon, gr-r-r!”

La edzino ridadis ĝislarmede. La delegito koleris, forĵetis la leterojn kaj iris liten.

La sekvantan matenon li frue ellitiĝis, dum la edzino ankoraŭ dormas. Li eniris la apudan ĉambron por ree provi ĉu la birdo komprenas Esperanton aŭ ne. La kaĝo estis malplena. Apud la sofo kuŝis la birdo mortigita kaj jam duonmangita. Apud ĝi sidis la domkato, lekante la lipojn.

Sinjoro Davis envolvis la birdan kadavron en paperon, surmetis siajn ĉapelon kaj palton, kaj ekiris al la dombesta vendejo por redoni la birdon al la administranto, kaj por postuli la returnon de sia mono. Sur la pordo li legis freŝe pentritan afiŝon:

Fermita, laŭ ordono de la polico

Mi aŭdis

Esperantajn kantojn...

Ho, melodio dolĉdolora!

Ho, verso, verso vi sonora!

Unika tuto de du ĉarmoj

ree inspiris min ĝis larmoj.

*Se aŭdas mi la vortojn flui:
Flavaj grenkampoj ritme ondas.*

*Se aŭdas mi arpeĝojn brui:
Verdblua maro fone tondras.*

*Ja kia forto! Kia vivo!
Kaj iu diras: Lingvo arta;
Verko kreita por arkivo.
Ne estas vero. Eĉ ne parta.*

Ho, melodio dolĉdolora!

Ho, verso, verso vi sonora!


Min ne kalkulu en dubantojn:

mi a ŭ d i s Esperantajn kantojn.

ELI URBANOVA

NORD-AMERIKA MODERNA MUZIKO

De Elwyn C. Pollock



La plej interesa libro
aperinta ĝis nun en Esperanto
El ĉie kaj pri ĉiaj aferoj!

Prezo \$1.65, inkluzive sendkostojn

Mendu de:

Esperanto League Book Service
Middleton, Wisconsin

Klementin'

(“O, my Darling”)

En kaverno, en kanjono,
Elfosante en la min',
Jen ministo, orserĉisto,
Kaj filino, Klementin'.

Mia kara, mia kara,
Mia kara Klementin',
Vin neniam mi revidos,
Malfeliĉa Klementin'.

Grandajn havis ŝi picdojn
Malsimile al fein'.
Ne tre bela, nek fidela,
Estis vi, ho Klementin'.

La anasojn al la akvo
Alkondukis la knabin',
Enpensante, malzorgante,
Kaj enfalis Klementin'.

Ruĝaj lipoj super akvo
Kriis, ke mi savu ŝin.
Ne naĝanta la amanto;
Kaj vi dronis, Klementin'



Tria Movimento

Adaĝio

Samuel Barber naskiĝis en West Chester, Pa., la 9an de Marto, 1910. La patro estis kuracisto, kaj la patrino estis fratino de la fama amerika kontralto, Louise Homer. De la sepa jaro lia muzika talento estis klare videbla, kaj je la aĝo de 13, oni akceptis lin kiel unu el la unuaj studentoj por ĉeesti la nove establitajn “Curtis-Instituto de Muziko” en Philadelphia, fondita kaj subtenita de S-ino Curtis Bok, al kiu la bela “Shelley Muziko estis dediĉita.

En 1932 li diplomiĝis, kaj post tri jaroj gajnis la “Prix de Rome”. Dum du jaroj li studentis ĉe la amerika akademio en la itala ĉefurbo. Tiam pli da honoroj venis al li. La Pulitzer-Premion li ricevis dufoje (1936-37), distingo, kiun ricevis ĝis tiam neniu alia muzikisto. Oni ofte prezentas lian muzikon tie ĉi, en Anglujo, Salzburg, kiel ankaŭ en Romo. Multaj el liaj komponaĵoj estis komisiitaj de la Alice M. Ditson Fondaĵo de la Universitato Columbia, kune kun la Baletto “Media” por Martha Graham.

Toscanini kaj la NBC Orkestro prezentis la komponaĵon “Adaĝio por Kord-instrumentoj”, dum sia sudamerika vojaĝo. Ĝi estis la sola amerika komponaĵo tiel notinde honorata de la muzikmajstro.

Oni asignis Samuel Barber al la klaso de “Nov-Romantikoj”, kaj li estas konsiderata de multaj kiel ĝia plej elstara reprezentanto. Lawrence Gilman priskribis la uverturon al “La Skolo por Skandalo” jene: “Partituro de ensorĉita gajeco kaj fleksiĝemo elmontrante la kvaliton de genieco, kaj donante multe da plezuro al la aŭdantaro.”

Pri la “Skolo por Skandalo”, Barber volis kapti la spritan kaj ironian spiriton de la fama komedio de Richard Sheridan prefere al komponi incidentan muzikon kiel fonon por ĝin prezentan en la teatro. La uverturo estis unue prezentita, en 1933, de la Philadelphia Simfioniorkestro; kaj poste oni ĝin prezentis tra Usono kaj alilande.

La verko ricevis la BEARNS-Premion de \$1200.00, honoron, kiun Barber dufoje ricevis de Columbia Universitato. (La unuan en 1928 por la “Sonato por Violono kaj Piano”.)

Kontraste al la uverturo, Barber atingis altan nivelon en la tiel nomata “incidenta muziko”, en sia “Muziko por Sceno de Shelley”. Li mem ĝin priskribas: “Dum la somero de 1933 mi estis leganta la majstro-verkon de Shelley, “Prometeo Senĉenigita”. La linioj en Akto 2, Sceno 5, kie Shelley indikas muzikon, sugestis la komponaĵon. La verko estas vere incidenta muziko por ĝuste tiu ĉi sceno kaj tute ne rilatas la figuron de Prometeo.” La Novjorka Simfioniorkestro unue ĝin prezentis la 23an de marto, 1935.

La muziko komenciĝas mallaŭte kaj mistere per la murmurado de dampitaj ald-kaj altviolonoj, bazita sur karakteriza ritma figuro — grava elemento en la evoluado. La kornoj ludas frazonde malsuprenigaj harmonioj, kiuj kondukas al plenorkestra kresendo kaj al nova subjekto en la kordinstrumentaro. La muziko daŭrigas kreski al forta klimakso kaj tiam la misteraj harmonioj de la komenco estas denove aŭdataj de dampitaj kordoj kaj harpo, finiĝante mallaŭte per longaj, daŭrigataj akordoj ludataj de dampitaj kornoj.

La “Adaĝio por Kordinstrumentoj” estis unue komponita kiel la malrapida movimento de kord-kvarteto en B-minora, kaj dum la sama jaro estis prezentita en Romo de la “Pro Arte String Quartet”. La unua prezento en Usono kun plena kordorkestro okazis en Novjorko la 5an de nov., 1938, dum brodkasto de la NBC Simfioniorkestro, sub la direkto de Arturo Toscanini. La verko estas dediĉita al Louise kaj Sidney Homer.

La Adaĝio estas bazita sur sola lirika subjekto, kiun tuj anoncas la violonoj. La aldo-violonoj ĝin alprenas en kano-na-traktado. La subjekto reaperas en la aliaj voĉoj, poste plialtiĝante en la altkordoj al belega *fortissimo*. Mallonga paŭzo estas sekvata de dolĉa kaj trankvila finiĝo.

Oni povas verdir, resumante, ke la muziko de Samuel Barber elportas ne nur imagecan simpation kaj teknikan lertecon, sed respekton por mallongeco, kiu estas la animo de pli ol spriteco. Kiam li elfaris sian diron, li havas la bonecon ĉesi.

Jar-raporto de la ELNA-Estraro

al la Dua Kongreso de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko 1954

Estimataj Gesamideanoj:

Ni samideane salutas vin. Ni bedaŭras ke nia malnova samideano, John Bovit, ne povas partopreni ĉi tiun raporton. Lia morto, je la 12a de marto, 1954, estis grava perdo al nia movado. S-ano Bovit ĉiam batalis por la bono kaj frateco de la homaro. Ni daŭrigu lian batalon!

Nia raporto al la Unua Kongreso temis plejparte pri organiziĝo por la estontaj laboroj. Ni nun povas raportari ke nia laboro por progresigi la Esperanto-movadon en Norda Ameriko efektive komenciĝis, kaj nun staras sur firma sed ne sufiĉe vasta bazo. Necesas nun, ke ni plivastigu la bazon de nia laboro kaj ties agadkampon.

Pri niaj jamfaritaj laboroj:

I. La buĝeto de la Ligo nun estas ordigita. Tiu ĉi buĝeto difinas la uzadon de nia malgranda kaso, tiel ke membroj laborantaj por la Ligo ne plu devas mem pagi la kostojn de siaj laboroj. Necesas nun, ke ni pligrandigu tiun kason, por ebligi pli vastan laboron.

II. Nia Propaganda Komitato estas komencinta presigi folietojn por disvendi malkare al grupoj kaj individuoj. Antaŭe, ni devis uzi propagandilojn de aliaj organizaĵoj, escepte unu folion, kiun unu el niaj membroj presis kaj disvendis. Estonte, ELNA mem havos serion de propagandaj folietoj, kaj espereble baldaŭ pli grandajn kaj pli efikajn propagandilojn. Ĉiu folieto portas la adreson de ELNA, aŭ de iu servo kunlaboranta kun ni. Ĉiu ankaŭ havas spacon por enmeti la adreson de loka grupo aŭ aktivulo, por helpi la varbadon por la lokaj grupoj. Pri tiuj ĉi, necesas nun ke la membroj aĉetu kaj disdonu multnombre la folietojn, kaj tiel krei intereson pri Esperanto, pri la Ligo, kaj pri la lokaj grupoj. La Propaganda Komitato ankaŭ klopodas starigi "vagantajn ekspoziciojn". Ni bezonas helpon de la lokaj kluboj en starigo kaj uzado de tiuj ĉi.

III. La Organiza Komitato klopodas starigi regionajn federaciojn. Ni proponas al la membroj, ke la regionaj organizaĵoj estu tute aŭtonomaj, ke ili baziĝu tute sur la iniciativo de la membroj mem, kaj ke gesamideanoj, kiuj ne estas ELNA-anoj, partoprenu egalbaze en ili. Kvankam ni ne multe sukcesis pri regiona organizado, niaj laboroj efektiviĝas pli bonajn interkonatiĝon kaj kunlaboradon ĉe la membroj en kelkaj lokoj. Ni devos akceli tiun kunlaboradon. La membroj mem devos, ĉu per formala regiona organizado, ĉu per neformala interhelpo, pligi la regionan kunlaboradon.

IV. La Ligo nun havas korespondan kurson en Esperanto, gvidatan de S-ano Dormont. La Komitato pri Edukado pretiĝis, kaj planas pluajn, helpilojn por klasoj. La Komitato ankaŭ presigis la Kantfolietojn, kiujn vi vidos ĉe la Kongreso, kaj esperas tre baldaŭ prezenti pluajn kantfoliojn kaj aliajn Esperantistigilojn.

V. La Revuo nun estas definitive starigita, aperas regule ĉiun duan monaton, estas bonaspekta kaj bonenhava, kaj sendube konstante pliboniĝos. S-ano Richardson, nia Redaktoro, multe klopodas por ke ni povu fieri pri nia gazeto. Kelkfoje ni dissendis la Revuon al granda listo da eblaj interesuloj. Espereble, ni povos fari same kelkfoje dum la venonta jaro. Krom tio, ni ebligis, ke membroj povu tre malkare aĉeti la Revuon 15ope aŭ 30ope por disdoni, kaj ankaŭ malkare aĉeti donacabonojn por lernejoj, bibliotekoj kaj infuĥavuloj, kaj tiel plivastigi niajn propagandon kaj influon. Necesos pri la Revuo, ke pli da membroj regule provizu raportojn pri lokaj okazaĵoj, kaj ke ili aĉetu la donacabonojn por porti informojn pri nia laboro ekster nian propran membraron.

La formalaj decidoj de la Estraro, sur kiuj baziĝis la laboroj de la Estraro kaj ties komitatoj, aperis en la Revuo, laŭ nia decido ke ĉiuj decidoj estu publikigotaj, por ebligi referendumon se membroj malaprobos.

KONKLUDO

La organiziĝo nun estas kompletigita. Nia Ligo nun funkcias vige, sed ne sufiĉe vige. Ni estas pretaj provizi al la membroj propagandilojn, helpilojn por klasoj, korespondan kurson, helpon pri regiona organizado. Ni antaŭvidas konstantan plibonigadon de nia kapablo servi al la membroj kaj al la Esperanto-movado.

Necesas, ke ni akiru iom pli da mono por multoblige niajn laborojn. *Eĉ pli necesas*, ke la membroj nun avantaĝu sin per la servoj de la Ligo, vige partoprenu la laborojn, kaj tiel certigu ke Esperanto kaptos la intereson kaj bonvolon de la tuta nordamerika publiko.

Ni forte esperas, ke post ĉi tiu Kongreso la Ligo pli rapide progresos sur la vojo al sukceso, laborante sur bazo de demokratismo, neŭtraleco kaj malcentrigo de la laboro.

F.R. Carlson, Estrarestro.

Saĝaj doroj de Benjamin Franklin:

La ŝuldataj havas pli bonan memoron ol la ŝuldantoj.

Se vi volas kaŝi sekretojn de malamiĝo, ne diru ĝin al amiko.

Tenu la okulojn plene malfermitaj antaŭ edziĝo, kaj duone fermitaj poste.

Tri homoj povas teni sekretojn, se du estas mortintaj.

NIAJ MEMBROJ

S-ano Conrad Fisher, nia nova Sekretario, estas jam konata de niaj legantoj kiel la aŭtoro de la rubriko "Esperanto and stamps". Li servis antaŭe kiel Financa Sekretario de ELNA, kaj li estas la usona reprezentanto de la Internacia Asocio de Poŝtmark-Kolektantoj (IAPK) kaj de ĝia organo, *La Filatelisto*.

"En 1926," rememoras S-ano Fisher, "najbaro fortranslokiĝis kaj diris al mi kaj al miaj fratoj, ke ni povas havi la malnovajn gazetojn en la domo. Inter ili troviĝis numeroj de *Radio News*, en kiuj aperis serio de 'Lécionoj en Esperanto' de James Densen Sayers. Ĉi tiu estis mia unua kontakto kun Esperanto. Mi sendis poŝtmarkon por la folio 'Esperanto at a Glance', kaj per tio mi eklernis."

S-ano Fisher fariĝis membro de UEA kaj de EANA en 1930, kaj de 1935 li servis kiel delegito de UEA. Li fariĝis ano de nia Ligo frue en ĉi tiu jaro, kaj estas membro ankaŭ de la Universala Ligo.

Teknikisto pri aercondiĉoj, S-ano Fisher postenas ĉe The American Viscose Corporation en Meadville. Li estas patro de tri filinoj, Marcella, Margaret, kaj Rose (Manĵo, Penĵo, kaj Ronĵo) kiuj havas la aĝojn de 12, 10, kaj 8 jaroj. La du pli aĝaj knabinoj jam povas legi en Esperanto.

Krom la multaj aliaj agadoj, S-ano Fisher nun laboras super poŝtmarka albumo, kiun li projektas por ekzistantaj kaj ekzistontaj Esperanto-poŝtmarkoj, kaj ankaŭ planas albumon por Esperantaj poŝt-stampoj.

LETEROJ DE L. L. ZAMENHOF

La tragedio de lia vivo rivelita de lia retrovita korespondo kun la francaj eminentuloj. Prezento kaj komentario de Prof. G. Waringhien.

1a volumo, 1901-1906—388 paĝoj

2a volumo, 1906-1914—374 paĝoj

Nuna prezo: Ĉiu volumo \$ 2,25

Mendu de:

Esperanto League Book Service

Middleton, Wisconsin



**Esperanto
and Stamps**
by *Conrad Fisher*
RFD1, Meadville, Pa.

In commemoration of the fiftieth anniversary of the Esperanto movement in Austria, the post-office department of that country has issued a new stamp. The design is olive-brown with an emerald green star printed in the center. Around the edges are the words "50 JAROJ ESPERANTO MOVADO EN AŬSTRIO." The value is one shilling, and the stamp is considered the most beautiful of all Esperanto stamps.

The stamp was designed by the famed painter Ernst Schrom, and the engraving was done by Georg Wimmer. There were two million sold, in sheets of fifty. The stamp was valid beginning on the first day of the Austrian Jubilee Esperanto Congress, the fifth of June.

Congress mail was cancelled with a special cancellation, bearing the text "WIEN 9-5.VI.54—50 JAROJ ESPERANTOMOVADO EN AŬSTRIO—OSTERREICHISCHER JUBILAUMS—ESPERANTO—KONGRESS."

I was lucky enough to get a full sheet, two first-day covers and a copy cancelled at the Congress.



Anton Balogus
St. Pölten, Kirchenweg 17
(Austria)



Drucksache

S-ano
Conrad Fisher,
Red 1,
MEADVILLE, Pa.
U s o n o

THE ESPERANTO LEAGUE BOOK SERVICE

Middleton, Wisconsin

Poemoj de Omar Kajam, <i>Waringhien, paper, 60 pp.</i>	\$.85
Historio de S.A.T., <i>paper, 152 pages</i>	1.30
Sennacieca Revuo, 1952-3-4, <i>each</i>	1.00
Aŭskultu la Voĉojn de Oceano, <i>paper, 53 pages</i>	.45
Kvaropo, <i>Auld, Dinwcodie, Francis, Rossetti;</i> <i>paper, 267 pages</i>	1.50
La Arto Fariĝi Centjara, <i>Wegner, paper, 59 pp.</i>	.50
Sveda Novelaro	1.50
Interpopola Konduto, <i>Privat</i>	1.00
La Gaja Podio, <i>Schwartz</i>	1.40
Jugoslavio kaj Ĝiaj Popoloj, <i>cloth, ill., 304 pages</i>	2.50
La Bapto de Caro Vladimir Borovsky, <i>141 pages</i>	1.50
Deveno kaj Vivo de la Lingvo Esperanto, <i>Stojan</i>	.70
La Nuna Stato de l' Evoluismo, <i>Rostant, cloth</i>	1.00
Triesto al Kiu? <i>paper, 44 pages</i>	.50

Write for complete listing

North American Esperanto Review
6205 South Prospect
Tacoma, Wash.

Return Postage Guaranteed

Form 3547 requested